

# STARO

**N-ro 3/2015 (256)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



Ĉeĥa karavano en Bulonjo-ĉe-Maró

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

**Fio banka Svitavy**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidentino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumado, kontakto)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

## Revizia komisiono de ĈEA:

**Prezidanto:** Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorferdomo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, [muzeo@esperanto.cz](mailto:muzeo@esperanto.cz), [www.muzeum.esperanto.cz](http://www.muzeum.esperanto.cz)

**Kontrollegis:** la komitato, P. Polnický, V. Türk

# 100-a Universala Kongreso de Esperanto

Lillo, Francio, 25 julio – 1 aŭgusto 2015

Ĉi-jara temo estis **Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj**. Venis 2695 partoprenantoj el 82 landoj.

La franca urbo situas proksime ĉe belga landlimo, tial la partoprenantoj ekskursis al Bruselo, Bruĝo, Antverpeno kaj unu ekskurso eĉ al Boulogne-sur-Mer.

El Ĉeĥio venis aŭtobuso de AEH, la kongreson nome de ĈEA salutis Libuše Dvořáková el Svitavy.



La kongreson salutis ankaŭ **Louis Zaleski-Zamenhof**, nepo de la Majstro, kaj fama israela verkisto **Amoz Oz**, kies rakonto *Esperanto* aperis mallonge antaŭ la kongreso. La rakonto priskribas lastajn tagojn de malsana esperantisto Marteno Vandenberg, kies idealisma kredo ne ŝanceliĝis eĉ antaŭ la morto en kibuco, malriĉula kvartalo. La ĉefan paroladon prezentis Mark Fettes.

La kongresanoj spektis plurajn teatrojn,

nome *Dante*, *Ursula*, *Feliĉas ĉiuj*, *Ĉa-grenej*, *Viro-semo*, aŭskultis koncertojn de 15 kantistoj aŭ grupoj, prelegojn pri Francio kaj minikurson Franca eksprese. Dek prelegojn prezentis IKU (Internacia Kongresa Universitato), siajn kunvenojn havis fakaj asocioj (matematikistoj, medicinistoj, instruistoj ktp.).

En la vestiblo elkreskis centoj da tabloj, kie unuopaj asocioj povis prezenti sian landon. Ankaŭ nia tablo estis tre sukcesa.



En la kongreso estis proklamitaj rezultojn de Belartaj Konkursoj, honoritaj meritplenaj esperantistoj.

Ĉar la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller emeritiĝas, estis elektita lia anstataŭanto d-ino Veronika Póor.

Dum la kongreso aperis ses numeroj de la kongresa kuriero Belfrido kaj estis akceptita la kongresa rezolucio.

La kongreson vizitis infana kongreseto. Fine la flago estis transdonita al Petro Baláž, organizanto de la 101-a UK en Nitra 2016. Li ĉiujn surprizis, kiam li surgenuiĝis kaj petis la manon de sia koramikino.

Al UK Nitra 2016 vi povas aliĝi jam nun!



## Nova Ĝenerala Direktoro



Veronika Poór ekoficos ekde la **unua de januaro 2016** kiel oficisto. Sekvos ĉirkaŭ dumonata transira fazo, en kiu la nuna kaj estonta direktoroj kunlaboros pri la transdono de taskoj.

Veronika Poór naskiĝis en 1983. Ŝi doktoriĝis pri fiziko, en la kampo de nanoteknologio. Ŝi kunfondis la retradio-kanalon Muzaiko kaj estas estrarano de TEJO, respondeca pri Aktivula Trejnado, Eksteraj Rilatoj, Homaj Rimedoj kaj Scienca kaj faka agadoj. En tiu rolo ŝi interalie verkis kaj kunverkis kvin retajn trejnadojn de TEJO, estis elektita por la Konsila Konsilio pri Junularo de la Konsilio de Eŭropo, ŝi superrigardis la kreadon de nova enkonduko por novaj membroj kaj ekorganizis Sciencajn Prelegsesiojn. Aldone ŝi grave kontribuis al la verkado de sukcesaj subvencipetoj de TEJO.

*Stefan MacGill, KN 56  
Vicprezidanto de UEA  
laŭ Belfrido n-ro 6*

## UEA PREMIIS DEK DU ELSTARAJN AGANTOJN

En la Solena Fermo de la 100-a Universala Kongreso en Lillo estis anoncigitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007. Jen la ĉi-jaraj distingitoj:

### Diplomo pri Elstara Agado:

**Richard DELAMORE** (Aŭstralio) pro la realigo de la reta Esperanto-Televido;

**DOI Chieko** (Japanio) pro longtempa redaktado de "Esperanto en Azio";

**Ilona KOUTNY** (Pollando) pro la gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato A. Mickiewicz en Poznańo;

**Birthe LAPENNA** (Danio) pro konservo de la materialoj pri la Montevidea rezolucio k.a. dokumentoj de Ivo Lapenna ĉe la Dana Ŝtata Arkivo;

**Ĵak LE PUIL** (Francio) pro la eldonado de la revuo "La KancerKliniko" ekde 1976;

**Ana MANERO** (Hispanio) pro la gvidado de la projekto Bitoteko de Hispana E-Federacio;

**Chuck SMITH** (Germanio) pro la realigo de la Esperanto-kurso en Duolingo;

**László SZILVÁSI** (Hungario) pro informa kaj ĵurnalisma Esperanto-agado;

**Francisco L. VEUTHEY** (Nederlando) pro la realigo de 75 filmoj por la Reta Kinejo de UEA;

**Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia** pro la organizado de Esperanta Filmfestivalo.


### Diplomo pri Elstara Arta Agado:

**Rogener PAVINSKI** (Brazilo) pro kontribuado al la muzika E-kulturo;

**WANG Chongfang** (Ĉinio) pro esperantigado de ĉina literaturo kaj pro vortara laboro;



## GIULIANO TURONE NOVA HONORA PATRONO DE UEA



La itala juristo Giuliano Turone fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Tiu honora organo konsistas el lingvistoj, sciencistoj k.a. eminentuloj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-Movado

kaj mem parolas kaj verkis en la Internacia Lingvo. Pri la elekto de Turone decidis la Komitato de UEA en sia kunsido en Lillo.

Turone naskiĝis en 1940. Li estas eksa juĝisto de la Supera Apelacia Tribunalo. Li estis ankaŭ profesoro pri viktimo-scienca, tribunalaj sciencoj kaj esplor-teĥniko en la Katolika Universitato en Milano. En Italio li estis vaste konata, ĉar dum sia kariero li okupiĝis pri famaj publikaj juraj procesoj, ekzemple pri prenado kiel ostaĝo de Rossi di Montelera, pri la aresto de la mafiestro Luciano Liggio kaj pri la kondamno de Michele Sindona pro la mortigo de la advokato Giorgio Ambrosoli. Li estis ankaŭ la esplor-juĝisto, kiu malkovris, ke la framasona grupo P2 efektive celis aranĝi ŝtatrenverson. De 2005 ĝis 2007 li estis konsilanto en la Supera Apelacia Tribunalo kaj poste profesoro en la Katolika Universitato en Milano. Li estis akuzanta juĝisto en la Internacia Pun-Tribunalo por la Eksa Jugoslavio en Hago.

Turone aperigis verkojn pri juro en la itala, i.a. *Il delitto di associazione mafiosa* (La krimo pri mafia kuniĝo; 2008) kaj, kun Gianni Simoni, *Il caffè di*

*Sindona. Un finanziere d'avventura tra politica, Vaticano e mafia* (La kafo de Sindona. Aventura financisto inter politiko, Vatikano kaj mafio; 2009).

En la 1960-aj jaroj Turone aktivis en junularaj rondoj italaj kaj internaciaj. Nuntempe li estas honora prezidanto de la laborgrupo “Esperanto por UN”, starigita de UEA. Lia hobbio estas aktorado; lastatempe li fariĝis konata pro la prezentado de teatraĵoj en la UK-oj en Florenco (2006), Havano (2010) kaj ĉijare en Lillo. Li prizorgas ankaŭ retejon, en kiu li prezentas la ĉefverkon de Dante Alighieri en pluraj lingvoj, i.a. Esperanto.

## PREMIO DEGUĈI 2015 AL ÉVA FARKAS-TATÁR




Éva Farkas-Tatár naskiĝis en 1924. Ŝi lernis Esperanton 37-jara en 1961. En la sekva jaro ŝi partoprenis la Universalan Kongreson en Kopenhago, kiu tiom ravis ŝin, ke ŝi decidis plene dediĉi sin al la instruado de

Esperanto. Por perfektigi pri tiu arto ŝi iris al la UK en Hago en 1964 por sekvi lecionojn de Andreo Cseh. Tiel komenciĝis 50-jara instrua agado per la Cseh-metodo en multaj landoj kaj ĉe multaj UK-oj kaj plej diversaj aliaj renkontiĝoj. Ŝi revenigis la Cseh-metodon al ĝia kerno: la gaja, luda maniero, dank' al kiu la lernantoj tuj ekparolas Esperante. Tiun arton ŝi transdonis al multaj novaj instruantoj, kiujn ŝi trejnigis per Cseh-seminarioj, interalie en UK-oj.


*laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## DU NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA



**André Cherpillod** naskiĝis en 1930 kaj estas emerita mezlerneja instruisto pri naturscienco. Membro de UEA ekde 1956, li kunlaboris por Esperanto, Franca Esperantisto, Heroldo de Esperanto, La Gazeto, La Kancerkliniko, Monato k.a. revuoj kaj longe redaktis la poŝkalendaron La Jaro. De 1992 ĝis 2010 membro de la Akademio de Esperanto.

Cherpillod verkis ĉ. 130 diverstemajn librojn, kiujn li ofte eldonis samtempe en la franca kaj Esperanto, i.a. *Akada leksikono* (1986), *Kanto de Kantoj* (traduko el la Biblio; 1988), *La aglutinaj lingvoj kaj Esperanto* (1988), *Nepivaj vortoj* (1988), *Glozel kaj la prahistoria skribo* (1991), *Mil ekzotaj vortoj* (1992), *Kaj la suno haltis* (1993), *Konciza gramatiko de Volapuko* (1995), *Voyage au fil des mots* (1995), *La mortotuko de Torino* (1996), *Vortkonsisto, vort-farado, vortanalizo, vortordo* (1996), *La galla lingvo* (1999), *De la edikto de Nanto ĝis la ribelo de la kamizaroj* (1999), *Gaston Waringhien, heroldo de la Internacia Lingvo* (2000), *La kalendaro tra la tempo, tra la spaco* (2002), *Konciza etimologia vortaro* (2003), *La tradukarto kaj ties problemoj* (2003), *La Misteroj de la ĉina skribo* (2003), *Vortaro Volapük-Eo kaj Eo-Volapük* (2003), *La vortfarado en dek lecionoj* (2003), *Etimologia vortaro de la propraj momoj* (2005), *Hillel la saĝulo: lia vivo, lia instruo* (2005), *Lingvaj babilajoj* (2006), *Balenoj kaj delfenoj* (kun Marie-Christine Body (2006), *La Biblio, ĉu historio? ĉu legendoj?* (2008), *La kelt-semidaj lingvoj* (2008), *Medicina leksikono* (2009), *Les outils grammaticaux de l'Espéranto* (2009), *La gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj* (2009), *Franca slango kaj populara lingvaĵo* (2013), *Muzika leksikono* (2013), *Richard Wagner, lia vivo, lia verkaro* (2013) kaj *Mensogoj kaj sekretoj de la historio* (2015).



**Ulrich Lins** naskiĝis en 1943. Li studis historion, politikan sciencan kaj japanologion en la Universitatoj de Köln kaj Bonn. En 1971/72 li estis gast-esploranto en la Universitato de Tokio. Li doktoriĝis per tezo pri la historio de Oomoto (kun aparta atento al ĝia pozicio en la japana naciismo); la disertacio aperis libroforme en 1976. Profesie li okupiĝis ĉefe pri la interŝanĝo de universitatoj inter FR Germanio kaj aziaj landoj kaj tiucele loĝis en Japanio (1978-1983 kaj 1999-2004).

Ulrich Lins eklernis Esperanton en 1958. Ekde 1959 li estas membro de UEA. Li havis diversajn funkciojn en la Movado, unue en Germana Esperanto-Junularo. De 1964 ĝis 1969 li estis estrarano de TEJO, kreante i.a. la kategorion "Patronoj de TEJO". De 1970 ĝis 1974 li estis kunredaktoro de *Kontakto*. De 1967 ĝis nun, kun interrompoj, komitatano de UEA, de 1989 ĝis 1995 vicprezidanto de UEA kaj de 2011 ano de la Elekta Komisiono de UEA. Ekde 1989 li estas prezidanto de la juĝkomisiono de Fondaĵo Antoni Grabowski.

Lins kunredaktis la verkon *Esperanto en perspektivo* (1974), germanlingvan libron pri german-japanaj rilatoj (1977), 12-voluman japanlingvan verkon pri la historio kaj nuntempo de Germanio (1981-1986) kaj la festlibron por H. Tonkin *La arto labori kune* (2010). Krome, li redaktis reeldonon de *Vivo de Zamenhof* de E. Privat (2007) kaj la kolekton *Aziaj kontribuoj al esperantologio* (2008). En 1988 aperis de li *La danĝera lingvo*, kiu estas tradukita en ses lingvojn (nova eldono preparata), kaj en 2008 *Utila Estas Aliĝo. Tra la unua jarcento de UEA*. Pli ol cent artikoloj, ĉefe pri historiaj temoj, aperis en Esperanto, la germana, angla kaj japana.

Kun sia japana edzino Lins havas du gefilojn, el kiuj unu, la filo Marko Naoki, aktivis en la junulara Esperanto-movado.

*laŭ Gazetara Komunikado de UEA n-ro 584*

## BELARTAJ KONKURSOJ 2015

### POEZIO:

**Unua Premio:** Mao Zifu pro *Memoro*;

**Dua Premio:** Jorge Camacho Cordón pro *Kredo*;

**Tria Premio:** Paulo Sergio Viana pro *Rimoj neperfektaj*;

**Honora Mencio:** Jorge Camacho Cordón pro *Ĉiu nova persono* kaj Ewa Grochowska pro *Hajkoj*.

Partoprenis 38 verkoj de 19 aŭtoroj el 15 landoj.

### PROZO:

**Unua Premio:** ne aljuĝita;

**Dua Premio:** Nicola Ruggiero pro *Burĝonos la migdalfloroj*;

**Tria Premio** Jesper Jacobsen pro *La tirkesto*.

Partoprenis 22 verkoj de 13 aŭtoroj el 13 landoj.

### TEATRAĴOJ:

**Unua Premio:** ne aljuĝita;

**Dua Premio:** Nicola Ruggiero pro *Adiau al la suno*;

**Tria Premio:** Amin Naor pro *Bonaj intencoj*.

Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el kvar landoj.

### ESEO:

**Unua Premio:** ne aljuĝita;

**Dua Premio:** Nicola Ruggiero pro *Pri mondo nokta, pleje mallogika*;

**Tria Premio:** Davide Astori pro *Lingvoj, valoroj, kulturoj, mondkonceptoj en dialogo*.

Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el du landoj.

### INFANLIBRO DE LA JARO:

Eldonejo Erroteta pro la libro *Usoa venis fluge kaj Sola kaj senvosta* de Patxi Zubizarreta, tradukita de A. Arana.

Partoprenis 4 verkoj de 3 eldonejoj el tri landoj.



Por la UK en Lillo aperis ankaŭ unua traduko el la israela verkisto Amos Oz, rakonto *Esperanto*.

## REZOLUCIO DE LA 100-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Lillo, Francio, la 1-an de aŭgusto, 2015

**La 2 695 partoprenantoj en la 100-a Universala Kongreso de Esperanto,**

**kunveninte** el 82 landoj, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015, en Lillo, Francio,

**diskutinte** la temon *Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj* en sep diversaj sesioj tra la kongresa semajno,

**volante kontribui** al la disvolviĝo de la Internacia Jardeko por la Alproksimiĝo de Kulturoj proklamita de Unesko,

**konstatas**, ke interkultura dialogo estas same urĝe necesa hodiaŭ, kiel ĝi estis antaŭ 110 jaroj, kiam okazis la unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Maró;

**asertas**, ke por vere interkomprenigi la homojn, tiu dialogo devas esti afero ne nur de la cerbo sed ankaŭ de la koro, kunplektanta klerigon kaj kundiskutadon, arton kaj amikecon;

**atentigas**, ke ĝuste tian multflankan interkulturan dialogon praktikas kaj disvolvas la tutmonda Esperanto-movado en siaj centoj da kongresoj kaj renkontiĝoj ĉiujare;

**instigas** ĉiujn aliajn aktivulojn kaj movadojn por interkultura dialogo doni pli da atento al la lingva dimensio de sia laboro, kaj al la reala funkciado de Esperanto kiel lingvo inkluziva kaj egaleca, kies uzado povas plifaciligi kaj pliprofundigi tian dialogon;

**ree dediĉas** sin al la kultivado kaj disvastigado de la valoroj de reciproka respekto, paco kaj justeco inter ĉiuj homoj, konforme al la celoj de Unesko kaj kunlige kun la aktualaj streboj de Unuiĝintaj Nacioj por konstrui daŭripovan mondan socion.

### 6-a Afrika Kongreso de Esperanto okazos en Burundo en 2016

Ankaŭ ĝi estos organizata de la Afrika Komisiono de UEA kunlabore kun la landa Esperanto-asocio (ANEB) kaj lokaj aktivuloj en Burundo.

*laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA*



# Mia unua Universala Kongreso

Kiel mi ie diris, mi esperantistiĝis en la jaro 2012. Ĝuste nun estis tempo por ekkoni la lulilon de ĉiuj esperantistoj, tial mi ĉijare – dum la 100-jara solenaĵo – troviĝis en Bulonjo ĉe Maro busvojaĝinte kun ĉeĥaj kaj saksaj samideanoj. Parolo de urbestro daŭris multe da tempo, flagoj gaje svingis, suno brilis kaj bele iluminis la statuon de la kreinto de universala lingvo – Ludoviko Lazaro Zamenhof. La etoso ĉe ĉiuj partoprenantoj ankaŭ solene lumis kaj ni amase marŝis al nova urbodomo, kie ni ĉiuj, centoj da samideanoj, trovis azilon trinkante ĉampanon okaze de tiu solenaĵo.



Belegan momenton mi travivis, kiam mi staris apud nepo de nia Majstro, nun maljuna Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof. Ankaŭ li vojaĝis kun sia filino soleni bonan ideon de sia avo – krei egalrajtan komunikilon por tuta mondo.

Nia esperanta komunumo festis cent jarojn de Universalaj Kongresoj en esperanta movado. Francoj bone pritraktis organizon kaj atenteme pretigis la lokon en la urbo Lillo. Teknike ĉio brilis, funkciis eĉ helpaj servoj, kiel vest-deponejoj, mesaĝlokoj, refreŝiglokoj,

poŝtservoj, informejoj ktp. Konstruaĵo kaŝis tutan nombregon de partoprenantoj – ĉirkaŭ 2700 homoj. Eĉ la plej granda salonego Zamenhof ne sufiĉis al ĉiuj ĉeestantoj kaj ni devis sekvi programon en tri salonegoj kun grandaj ekranoj.



Sinjoro David, loĝinta en Lillo, montris al ni interesajn monumentaĵojn en urbocentro. Kiam mi vagadis vespere ĉirkaŭ du stacidomoj, mi trovis straton de Prago. Tio vere surprizis min. Ni ne povis forgesi viziti citadelon, nun urban parkon.

Nia ĉeĥa-saksa grupo tre bone ĝuis komunan tempon, en buso ni kantis kaj gajigis aliajn rakontante ŝercojn. Ĉiutage nia organizantino Lenka Angelová pretigis prelegon pri vizitota proksima urbo.

Nun restas rememoroj en niaj koroj pri nia solenaĵo kaj novaj amikrilatoj kreitaj dum vojaĝo. Esperanto vivis, nun vivas kaj esperante ni kredas je la nova reviviĝo.

*Jarka Malá*



## La 100-a UK laŭ okulatestanto

Cent dek jaroj pasis de post la unua Universala Kongreso okazinta en Bulonjo-ĉe-Maró. Ĉi-foje oni elektis kiel kongresurbon Lillo en nord-orienta parto de Francio. La kongreso okazis en moderna konstruaĵo *Lille Grand Palais*. Al ĝi enskribiĝis 2689 personoj el 81 landoj de kvin kontinentoj: rekorda nombro da partoprenantoj de UK-oj okazintaj en la 21a jarcento. Informoj pri la evento estis bone disvastigitaj. En la urbo aperis multaj afiŝoj pri la aranĝo kaj pri la publika programo, kiu okazis ĉiutage posttagmeze sur la placo de la Teatro. Prezentiĝis diversaj muzikgrupoj inter kiuj ne mankis JoMo, La Kompanoj, Kapriol, Kajto.

La temo de la kongreso estis: “Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj”. La programo estis varia kaj riĉa kun interesaj prelegoj, diskutoj, debatoj, E-kursoj kaj lingvokursoj, KER-ekzamenoj, filmoj, teatraĵoj, koncertoj, ekspozicioj, spektakloj kaj muzikaj prezentoj. Ĝi montris ampleksan kulturon kreitan de esperantistaro. Libroservo prezentis abundan kaj varian stokon da libroj, T-ĉemizojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis multnombraj eroj kaj aktivaĵoj. Kunvenis akademianoj, medicinistoj, fervojistoj, ateistoj, spiritistoj, bahaanoj, komunistoj, juristoj, blinduloj, skoltoj, vegetaranoj, komercistoj, matematikistoj, radioamatoroj, nefumantoj, kat-amantoj, SAT-anoj, legantoj de la revuo “*Esperanto*”. Plurfoje estis pritraktita la kongresa temo, okazis IKU-prelegoj kaj serio da prelegoj pri Francio, vinseminario, oratora konkurso.

Formiĝis internacia koruso sub gvido de Alan Bishop el Aŭstralio.

La poresperanta programo komenciĝis per Movada Foiro. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj aranĝoj dum la UK-oj. Tie sur 120 tabletoj diversaj asocioj prezentis allogan E-materialon kaj informis pri sia agado. Ĝi estas granda renkontiĝejo kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Dimanĉe okazis la Solena malfermo de la kongreso. Unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj ĝi estis rekte elsendita per interreto. Esperantistoj el pluraj partoj de la mondo povis sekvi ĝin. Kortuŝa estis la salutparolado de Louis Christoph Zaleski-Zamenhof, la nepo de la Majstro. La solenaĵon ĉeestis kaj alparolis la publikon ankaŭ la alta protektanto de la 100-a UK, la urbestro de Bulonjo-ĉe-Maró s-ro Frédéric Cu-villier.

La kongresa kuriero *Belfrido* ĉiutage informis pri novaĵoj, ŝanĝoj kaj aldonis liston de novaj kongresantoj. Ankaŭ la loka gazeto *La Voix du Nord* (La Norda Voĉo) ĉiutage informis pri kongresaj eventoj. Ne mankis intervjuoj kaj televid-elsendoj.





Veronika Poór estis elektita Ĝenerala Direktoro de UEA. Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio. Dekdu esperantistoj ricevis diplomon pri elstara agado kaj pri elstara arta agado. Okazis belartaj konkursoj kaj la tradicia aŭkcio, unu el la viglaj kaj ŝatataj programeroj (spektaklo), kiun majstre gvidas jam de kelkaj jaroj Humphrey Tonkin. Koreoj invitis kongresi en la jaro 2017 en Seulo, slovakoj - venontjare en Nitro. Junuloj havis abundajn kaj buntajn programerojn kaj amike amuziĝis. Infanoj ĝuis sian kongreseton. Same kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje okazis futbalmatĉo. Nia teamo konsistanta el entuziasmuloj tamen perdis 4-0 kontraŭ skipo de *Okcidenta Saharo*.



La kongresanoj havis eblon partopreni en diversaj ekskursoj biciklaj kaj busaj al Parizo, Amieno, Arraso, Bruĝo kaj al aliaj lokoj. La plej alloga estis tiu al Bulonjo-ĉe-Mar. Tie oni vizitis la teatron Monsigny, kie okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1905. La prezidanto de UEA Mark Fettes citis la tiaman paroladon de Ludoviko Zamenhof. Centoj da esperantistoj paradis

tra la stratoj kun afiŝoj kaj flagoj al la monumento de Zamenhof antaŭ la stacidomo kaj poste al la urbodoma akcepto. Tie post la paroladoj la esperantistaro estis regalita per vino, biero, diversaj suktoj kaj manĝaĵetoj. Vespere Guillaume (Guijom') Armide, la franca talenta muzikartisto preleg-koncertis en la bulonja teatro por la ĝenerala publiko, sed bedaŭrinde venis tre malmultaj personoj.

La 1-a de aŭgusto la jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto finiĝis. Dum la tuta semajno akompanis nin la giganto Zamenhof. Oni resumis la semajnan aranĝon, disdonis diplomojn pro la kvadekjara kaj kvindekjara membreco al UEA. Antaŭ la fino prezentiĝis sur la podio infanoj el Infana Kongreseto kaj kantis por la publiko. Gijom' Armide pianludis. Al Ĝenerala Direktoro Osmo Buler estis transdonitaj donacoj pro lia venontjara emeritiĝo. Clay Magalhães dankis kaj disdonis rozojn al ĉiuj LKK-anoj kaj al la helpantoj. Post la transdono de la verda standardo al la reprezentantoj de la LKK en Slovakio Petro Baláž kaj la urbestro de Nitro sincere invitis la ĉeestantaron al la 101-a UK, okazonta tie venontjare. Laste kaj neatendite por ĉiuj Petro Baláž petis edziĝon al sia pola koramikino Dorotka Rodzianko antaŭ kelkcentoj da spektantoj kaj donacis al ŝi fianĉringon. Fine estis kantata la Esperanto-himno *La Espero*.

*Liba Gabalda*





# Vizito el Francio

Dekdumembra grupo el franca regiono Toulouse sub Pireneoj, gvidata de Marie Savary, vizitis Ĉeĥion. Akompanataj de Pavel Polnický ili rondvojaĝis al Prago, Písek, České Budějovice, Český Krumlov, Brno kaj Svitavy. Kun svitavanoj ili vizitis Litomyšl kaj tombon de Karel Pič.

Ili renkoniĝis ĉie kun lokaj esperantistoj, diskutis, kantis kantojn, Georgie Garie desegnis karikaturon.



Kun esperantistoj en Písek ili vidis memorindaĵojn (kapelon de Sankta Johano Nepomucena) kaj kantis sur la urba insulo kun akordeono kaj gitaro. Ili lernis kanton Fiŝlago de Tálín.



En Brno ili diskutis en la klubejo



Kaj fine en Svitavy



# La 88-a SAT-KONGRESO

## 8-15. 8. 2015

Okazis en la slovaka urbo Nitra situanta 90 km for de la ĉefurbo Bratislava. La eventon partoprenis pli ol kvindeko da esperantistoj el dek ok landoj. La plej foraj kongresanoj alvenis el Aŭstralio, Argentino, Ĉinio, Japanio, Koreio, Madadaskaro kaj Usono. Inter la partoprenantoj estis pluraj gejunuloj, kiuj aktive intervenis kaj kontribuis al la programo.



Bonvenigis nin la ĉeforganizanto de la kongreso Peter Baláž. La kongresejo troviĝis en la universitata student-hejmo "Anton Bernolák". En la akceptejoj estis instalitaj tri libroservoj, surmure ekspoziciitaj glumarkoj kaj E-bildkartoj el privata kolekto. Ĉe alia flanko pendis pluraj T-ĉemizoj kaj sur la tabloj kuŝis aliaj esperantaĵoj por vendado. En apuda ĉambro ni admiris ekspozicion de diverspecaj bildoj.

Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn rimarkindajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana Sateh kaj Peter Baláž prezentis sian kolekton. Poste oni legis kelkajn salutmesaĝojn. La organizanto prezentis skize la programon de la semajno. Dum la kongreso

okazis kvar laborkunsidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj. Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj, LEA-komitato. Ni estis informitaj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de Sennaciulo, pri PIV, pri programo kaj planoj de E@I. Stano Marček prelegis pri fungoj kaj informis pri siaj lernolibroj *Esperanto per rekta metodo*. Pri la familio kaj la verkoj de la fratoj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle. Aldoniĝis prelego pri ŝovinismo prezentita de Johan Derks.



*Petro Chrdle prezentas fratojn Ĉapek kaj libron R.U.R.*

Kun Peter Baláž oni diskutis pri la temo *Ĉu ni pretas je grandaj ŝanĝoj*. Estis ellaborita kaj akceptita la Gvidrezolucio, en kiu oni krom aliaj gravaj punktoj substrekas la neceson respekti la liberon de penso kaj la privatecon de la homaro. Dum la unua duontaga ekskurso ni promenis tra la urbo Nitra piede kaj trajnete ĝis la katedralo. Ni vizitis ĝin kaj poste ni gustumis la mezepokajn trinkaĵojn preparitajn surbaze de herboj kaj kafon el glanoj spicitan per cinamo kaj kariofilo. Poste ni vizitis sinagogon, kiu nuntempe utilas kiel koncertejo.

Kontraŭ ĝi en bele ekipita teejo ni gustumis kelkajn specialajn teojn kaj kuketojn. Nia japana samideanino Hideko Huĝimoto sukcese prezentis kaj parolis pri la teo-ceremonio laŭ japana maniero.



La dua duontaga ekskurso kondukis nin al urbo Topolčianky, kie ni vizitis ĉevalojn. Tie oni bredas plurajn rasojn de ĉevaloj. Inter ili troviĝas ĉevalo, simbole donacita al la brita reĝino Elizabeth II dum ŝia vizito en Slovakio la 24-an de oktobro 2008. La reĝino kontribuas al ties zorgado kaj oni povas rimarki, ke la “reĝa” ĉevalo estas pli bone prizorgata ol la aliaj.



Poste ni vizitis burgon de la 15-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Laste ni vizitis la vinproduktejon sen la promesita gustumado.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la

historia urbo en meza Slovakio Banská Štiavnica. Ĝi estas konata pro minado de metaloj, ĉefe de arĝento. Unue ni vizitis la mineralogian ekspozicion kun multegaj, diversformaj kaj raraj belkoloraj ŝtonetoj. Post la tagmanĝo ni vizitis la minejon. Ekipitaj per kaskoj, mantelo kaj lanterno ni subteriĝis kaj paŝadis tra malhelaj koridoroj de la eksa minejo imagante la pezan laboron de tiamaj ministroj. La urbo estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj. En ĝi troviĝas la plej granda kripo *Bansko-štiavnický Betlehem*, kiun kelkaj el ni ankaŭ vizitis.



Vesperaj kulturaj programeroj konsistis el prezento de slovakaj popolmuzikoj, vingu gustumado kaj dancado, filmoj “Civitano 4” kaj “Ni ne plu estu sklavoj”. Teatraĵon R.U.R. prezentis studentoj el la urbo Svitavy. Koncertis por ni la muzikgrupo “No problem” el Ĉeĥio kaj Attila Schimmer el Aŭstrio regalis nin per kantoj el sia repertuaro kaj akrobataĵoj. Dum la adiaŭa vespero ni aŭskultis kantojn, gitarludadon kaj s-ino Tahira Masako el Japanio sukcese aŭkciis kelkajn esperantaĵojn. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.

La venontjara SAT-kongreso okazos en Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.

*Liba Gabalda*



# DRAMO EN SINAGOGO

aŭ

Ensemblo DOMA el Svitavy en SAT-kongreso



*Studenta ensemblo DOMA kun estrino Radka Oblouková kaj J. F. Řepa (Karel Čapek) kaj P. Chrdle (amiko de Čapek)*

La dramo **R.U.R.** aŭ **Terura Songô** estis sukcese prezentita en OSIEK-konferenco en Svitavy (2012), dum UK Rejkjaviko 2013, samjare dum teatraj festivaloj en Praha kaj Brno, en Itala Esperanto-kongreso 2014 kaj ĉi-jare en SES Martin kaj SAT-kongreso en Nitra. La spektaklo en Nitra estis derniero de R.U.R., kiu danke al Petr Baláž okazis en sinagogo, ŝanĝita al scenejo, kaj fariĝis neforgesebla travivaĵo.



Nokte la 13-an de aŭgusto esperantistoj kune kun slovakaj spaktantoj povis travivi “Teruran songon” de Karel Čapek. La sugesta medio, elvokanta temon de holokaŭsto, estis plej impresa kuliso pri detruo de la mondo, malamo, murdado kaj amo.



La derniero fariĝis travivaĵo, ĉe kiu “frostas la dorso”.

Radka Oblouková  
*estrino de DOMA*

*La studenta ensemblo DOMA (Docela Malé divadlo – Tute Malgranda Teatro) estisĝis antaŭ pli ol 20 jaroj en Svitavy kaj rolis en ĝi dekoj de infanoj kaj gejunuloj.*

# Bartošovice

1 - 4 Oktobro 2015



## Adreso de la lernejo:

Zámek Bartošovice 74254 Bartošovice 1  
Česka republika

En tiu ĉi konstruaĵo la partoprenantoj loĝos kaj manĝos. La instruado kaj la programo okazos parte en la bazlernejo, 150 m for de la kastelo.

## Instruado:

La instruado okazos en tri grupoj laŭ la lingvonivelo. Komencantojn instruos sinjoro Stano Marček kaj progresintojn Magdalena Fejfičová. Paroligan rondon gvidos Anjo Amika el Hungario, konata kantistino kaj redaktorino de Heroldo de Esperanto.

La kursoj okazas posttagmeze inter la 15-a kaj 19-a horo.

## Distra programo



Interkona vespero, ekskursoj (sportaj ŝuoj!), koncertoj (Anjo Amika, grupo Noproblem), ĉina vespero (Teo kaj amo).

verdastacio@gmail.com  
telefono 00420 608 003 593

# Skokovy

19 - 25 Oktobro 2015

**XLII. jazykový seminář**  
**lingva seminario**

pořádaný / organizita de  
Esperantským kroužkem Dr.Hradila  
Esperanta rondeto de Dr.Hradil

19.10.-25.10.2015

v penzionu ESPERO v obci Skokovy v Českém ráji  
en pensiono ESPERO en vilaĝo Skokovy en Bohemia paradizo

Více informací / Plu informoj:  
Jindřiška Drahotová  
drahotova@esperanto.cz  
+420 720 652 320

## En pensiono ESPERO en la vilaĝo Skokovy en Bohemia Paradizo

## Taŭga por ĉiuj homoj sen diferenco de aĝo kaj lingvonivelo.

Estas preparata renkontiĝo kun aktorino Stanislava Hošková (daŭrigantino de laboro de Eva Seemannová) kaj komputila konsultejo por komencantoj kaj progresintoj.



Familia etoso, senbariera medio, 2-4-litaj ĉambroj.

420,-Kč/tage por loĝado kaj manĝo + 100,- Kč por la programo. Pago surloke.

**Kontakt: Jindřiška Drahotová,**  
**drahotova@esperanto.cz,**

**tel. 720 652 320.**



# KOMENIO - ZAMENHOF

## La Vojo al Harmonio

*Jaroslav Karhan (fino)*

Ĝi povus esti instruata tutmonde sub aŭspico kaj inspekto de la kreiĝonta «Kosma ekumeno» – mondkonsilio por unueco en diverseco religia – kies komitatanoj estus fakuloj de **ĉiuj** religiaj komunumoj. Ili konstante serĉus ĉion, kio unuopajn religiojn unuigas reciproke, eĉ rilate Dion kaj kio povus esti universale, spontane akceptebla eĉ de nereligianoj, kiel fonto de universala harmonio. Por instruado en la tutmondaj elementaj lernejoj estos kompilitaj tiacelaj lernolibroj «Kosma ekumeno» en universala lingvo Esperanto.

En ili estos sisteme prezentataj – akorde al la aĝoj de lernantoj – la unueca, baza, religia fundamento, inspiroplena universalaj, moralaj valoroj, saĝoj eĉ utilaj medit-praktikoj, kapablaj edukadi junularon al unueca, pli supera mondrigardo kaj moralo. La komplekso memkompreneble kontraŭstaros specifajojn de neniuj religia komunumo.

Tiamaniere ĉiuj lernantoj trovos ĝustan sencon de siaj vivoj eĉ ĝustan vojon al kompleksa, interna eĉ ekstera vivharmonio. Samtempe tio certe fariĝos efika, mondskala, baza prevento kontraŭ la tiel danĝera drogomanio kaj analogaj malbonaĵoj.

La plej grava valoro de la nova lernobjekto estos: la tutmonda junularo – jam en la elementa lernejo – ekkonos unuecan, firman fundamenton en diversecoj lingva kaj religia, ebligonta al **ĉiu** kun **ĉiu** en la tuta mondo perfekte reciproke interkompreniĝi, senti sin ĉiuflanke egalrajta kaj bonkonduiti laŭ unueca

moralo.

La universala lingvo kun la Kosma ekumeno kreos simbiozon: la kosman etikon, kies kerno ekĝermos en la junularaj koroj kaj en ilia plenaĝo donos fruktojn de perfekta homekologio.

Ĉiuj homoj – vidonte tian praktikan efekton ĉe la tutmonda junularo – certe forlasos siajn antaŭjuĝojn kontraŭ tiu ĉi komuna vojo al la tuthomara harmonio kaj spontane ankaŭ ekpaŝos ĝin. La moderna homekologio – mondscale per ĉiuj homoj aplikata – faciligos krei la kompleksan mondekologion, en kiu – post tiom da tragikaj malakordoj – feliĉe vivos la saĝa homaro.

Tiamaniere eblos atingi, ke **ĉiuj** homoj spontane direktigos siajn pensojn al nia komuna Fonto de Vivo – Dio – analoge, kiel la magneta montrilo turniĝas al la norda poluso...

Per unueca rekono, ke en Universo ekzistas Majestato pli perfekta ol homo, kiun necesas respekti, ni ekvidos ĉiujn mondproblemojn en nova, specifa lumo, faciligonta trovi iliajn ĝustajn solvojn – sen tradukeblaj eraroj – origine en ĉies dua, komuna, universala lingvo.

La popoloj ne plu konstruos, prestiĝcele, diversajn babelajn turojn, sed – sur firma fundamento – praktikan tuthomaran domon, en kiu ĉiu nacio havos sian apartamenton kaj ĉiu unuopulo sian ejon, en kiuj povos ĉiuj libere, originalece, vivi. En la koridoroj kaj komunaj ejoj, ĉiuj parolos komunlingve kaj traktos laŭ unueca, kosma etiko.

Fajro nek akvo – nek aliaj, analoge antagonismaj, reciproke nepacigeblaj fortoj – ne plu minacados loĝantojn de tiu ĉi tuthomara domo, ĉar ili kapablos ĉiujn ecojn de tiuj ĉi fortoj prudente estri:

la domaĝajn jam prevente sendanĝerigi, la utilajn disponigi por **ĉies** harmoni-plena, prospera uzado.

Plene ekbrilos la plej grava parto de la «Vojo de lumo» de J. A. Komenio. Laŭ lia propra esprimo: «Tio estos kulmino de ĉio.» La homaro maturiĝos por konkorde iri la komunan vojon al la kompleksa harmonio.

## POSTPAROLO

Johano Amoso Komenio kaj Ludoviko Lazaro Zamenhof dediĉis siajn tutajn vivojn al strebado helpi al «Saĝeco, reĝino de la mondo», ke ĝi plibonigu evoluon de la homaro, per zorgo pri pli bona edukado, kulturo, reciproka interkompreniĝo kaj kompleksa harmonio. Bedaŭrinde tiuj ĉi iliaj penoj ne estis ĝis nun plene komprenitaj... Tial eĉ ni daŭre ankoraŭ vagas tra labirinto de multaj gravaj mondproblemoj, analogaj al ilia epoko...

Ni – homoj de kosma epoko, fine de la 2-a jarmilo – krome ekkonis, ke la grandega teknika progreso, kiu estis atingita, ne kapablas solvi ĉiujn mondproblemojn. Ni spertis, ke scienco povas facile neniigi pli ol ĝi kreis, ke plenan feliĉon kapablas doni al la homaro nur pli altaj, komunaj, spiritaj valoroj – universale akcepteblaj.

Tiujn ĉi povus fakte mondscale heroldadi la baza unuigilo de ĉiuj religioj – la Kosma ekumeno. La diversreligia, komuna preĝado por mondpaco – komencita en Assisi j. 1986 kaj poste ĉiujare okazanta en alia lando – estas ĝia aŭroro. La Kosma ekumeno fariĝos – laŭ vizio de Komenio – spirita suno, konstante disradiana harmoniigajn ideojn de ĉiuj religioj en korojn de **ĉiuj** homoj.

Ni helpu tutmonde akceligi ĝian aperon! En ĝia – ĉion trapenetronta – lumo, la homaj pensoj revenados – laŭ instruo de Komenio – de supraĵo de ĉiuj aferoj al ilia profundaĵo kaj Centropunkto – Dio.

Komenio, enkonduke de sia verko «Vojo de lumo» (kompilita en j. 1642, eldonita en j. 1668) proklamas: «La ĉefaj politikaj teorioj, je kiuj apogas sin la hodiaŭaj regantoj de la mondo, estas perfidaj marĉoj kaj faktaj kaŭzoj de la ŝanceliĝanta, malcerta kaj ruiniĝanta mondo... Necesas montri al teologoj kaj politikistoj, ke ĉio devas returniĝi al la Dia Lumo kaj al la Absoluta Vero...» – Ĉu tio multtrilate ne validas eĉ fine de la 2-a jarmilo?

En sia «Panergesio» li poste proklamas: «Ni ĉiuj estas kuncivitanoj de unu mondo, de unu sango, ni, la tuta homa gento. Kiu malebligos, ke ni unuiĝu en unu respublikon? Antaŭ niaj okuloj estas ununura celo: bono de la tuta homaro kaj ni demetas ĉiujn konsiderojn pri ni, pri nacieco, pri religio...»

En preparoj por ekpaŝi en la 3-an miljaron, ni pensu unuarange pri tiu ĉi celo kaj tutmonde, laŭ niaj ebloj, kreu – en ĉiuj vivsferoj, laikaj kaj religiaj – kondiĉojn, por ke ni povu plej baldaŭ ekiri la komunan vojon al la kompleksa harmonio, kiun testamentis al ni J. A. Komenio kaj L. L. Zamenhof.

## BIBLIOGRAFIO

- L. L. Zamenhof: Originala verkaro. De D-ro J. Dietterle. Eldonis Ferdinand Hirt, Leipzig, Germanio, 1929.
- Elektitaj verkoj de J. A. Komenio. Ŝtata pedagogia eldonejo, Praha, Ĉeĥoslovakio, 1975.
- Gazeto PACO, organo de MEM, Sofia, Bulgario (ĝis j. 1990), Herstal, Belgio (ekde j. 1991): artikoloj en la rubriko «Ekumena voĉo de paco»



## Duolingo kaj Lernu

**Duolingo** estas la plej sukcesa lingvo-instrua retejo en la interreto, funkcianta ekde 2012, precipe por anglalingvanoj. Pere de la ĉeĥa oni povas lerni sole la anglan, sed pere de la angla multajn aliajn lingvojn. La 28-an de majo 2015 estis funkciigita **Esperanto-kurso** por anglalingvanoj, al kiu ĉiutage aliĝas ĉirkaŭ mil novaj kursanoj. La nombron de 100 000 kursanoj la kurso atingis la 21-an de aŭgusto 2015 (por ni memor-ebla tago). Chuck Smith, aŭtoro de Esperantaj versioj de Vikipedio kaj de tiu ĉi kurso, esperas, ke ĝis la jarfino la kvanto de kursanoj duobliĝos. Iru al:

<https://www.duolingo.com/#courses/en>

Tie vi trovos ĉiujn kursojn kun aktuala nombro da kursanoj.

**Lernu** estas reta kurso de Esperanto por parolantoj de diversaj lingvoj, kiu estas jure registrita en Slovakio kaj ekzistas jam pli ol dek jarojn. Ankaŭ al ĝi registriĝis pli ol 150 000 homoj el la tuta mondo, el Ĉeĥio 462 gejunuloj ĝis 30 jaroj kaj 374 personoj super 30 jaroj (sume 836 homoj, el ili 145 Praganoj). El Slovakio 457 gejunuloj ĝis 30 jaroj kaj 299 homoj super 30 jaroj (sume 756, el ili 154 Bratislavanoj): [www.lernu.net](http://www.lernu.net).

La rezultoj montras, ke ankaŭ anglalingvanoj interesiĝas pri Esperanto, sed aliflanke la junan generacion ne plu logas nia tradicia kluba vivo, nek membreco en niaj asocioj, nek paperaj tekstoj. Ankaŭ kursanoj de aliaj lingvoj ne membriĝas en lingvaj asocioj aŭ kluboj, nek kolektas fremdlingvajn librojn kaj gazetojn. Sed ili ĉiutage vagas tra la interreto, serĉas informojn, amuzojn, diskutejojn, filmojn, e-librojn, kontaktojn kun samaguloj.

-mm-

## Novaj libroj



Jam la deka Legolibreto por la komencantoj estis prezentita en Skokovy kaj kreita de kolektivo de aŭtoroj, redaktita de Jindřiška Drahotová. Prezo 50 Kč + sendokostoj.

[drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz)

Ŝiaj senpagaj elektronikaj libroj:


<http://www.esperanto.wz.cz/Esp09.htm>

**Eva Kantůrková: Jan Hus.**

Fragmentojn el la romano esperantigis kolektivo de tradukantoj, redaktis Margit Turková. La traduko estas disponebla senpage en elektronika versio ĉe

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/kni-zni-novinky-2015.html>


Novaĵo el Slovakio venis de Anna Iváková, ŝia traduko de moderna poezio de Jozef Leikert, kunlaboris Jarmila Rehtorisová kaj Miroslav Malovec.



Mendojn akceptas:

[anna.ivakova@gmail.com](mailto:anna.ivakova@gmail.com)

**Věra Nosková: Metamorfozoj.**




Jan Werner kaj Věra Muchnová esperantigis romanon pri la politikaj ŝanĝoj ĉirkaŭ 1989. Prezo por 168 paĝoj estas 120 Kč + sendokostoj.

**Terminaro de kanalizacio**

ankaŭ de Jan Werner havas 90 paĝojn, estas eldonita koste de la aŭtoro.

Prezo 60 Kč + sendokostoj.

[vernerjan2@gmail.com](mailto:vernerjan2@gmail.com)



**Jan Werner:**

## **Terminaro de kanalizacio**

Ekde la jaro 2011 Jan Werner ĉiujare regule prezentas al esperantistoj unu sian novan publikaĵon. Fidela al sia faka teknika kaj Esperanta orientado, dediĉas sin en ili grandparte al konstruista Esperanta terminologio. Ĉi-jare ne estas escepto, kiel estas sciigita en titolo, temas pri publikaĵo koncernata pri terminaro de akvomastrumado, speciale pri kanalizacio de pli vasta vidpunkto, do inkluzive de purigo de akvo, kun superstaro en hidrologion kaj en purecon de supraĵaj akvoj.

La aŭtoro, ne nur en pritraktata publikaĵo, sed ankaŭ en pli fruaj tekstoj libraj kaj gazetaraj, jam longe atentigas neceson de vortproviza dividigado de Esperanto kaj ĝia literaturo de ĝia prefere organiza, socia kaj lingva celado kaj beletro al la praktika uzado en fakaj rondoj de ĉiuj sferoj, en korespondado kaj simpozioj kaj en verkado de la nova literaturo. Por tio evidente ne sufiĉas limigita lingva trezoro citata en PIV kaj aliaj ĝeneralaj vortaroj. Necesas krei kaj havi por uzado specialajn fakajn terminarojn de unuopaj sferoj ĝis bezonataj detaloj. Krome nepre bezono de sistema terminologia laboro dependas de ĉiama disvolvo de unuopaj fakoj, kie koincide estas en naciaj lingvoj kreaĵoj novaj terminoj, kiuj reflektu ankaŭ en Esperanta vortprovizo. Ekzemple pritraktata drenado de defluaĵoj post multjara praktikado, ŝajne nocie jam fermita, estas ankaŭ fako daŭre teknike evoluanta kaj tiurilate ankaŭ terminologie. Ni rememoru ekzemple novajn direktojn en drenado ankaŭ de malgrandaj domaroj helpe de premaj kaj vakuaj sistemoj, pli frue nevidataj, ofte vastaj grupaj kanali-

zacioj, kiuj per sistemo de pumpstacioj kaj relative malmultekostaj premaj duktoj certigas drenadon de defluaĵoj el pliaj civitoj por purigado en unu granda, kutime altrendimenta purigejo.

Ĉe studado de la terminaro al iu venos en la kapon, ke ĝi estas signifa ne nur per siaj novaj terminoj, sed ankaŭ kiel voko al Esperantistoj konantoj en iu fako al sekvado, do al kreado de diversaj terminaroj kaj tiumaniere al disvolvo de la vortprovizo kaj disvolvo de tuta Esperanto por ke ne okazu ĝia terminologia postrestado, sed male ĝia disvolvo harmonie kun disvolvo de la tuta socio. Nur tiel ĝi ĉiam restos moderna interkompreniga rimedo. Bedaŭrinde ĝis nun tiudirekta agado de Esperantistoj estis ĝenerale nur malgranda.

Krome en Esperanta movado restas granda nekonateco pri maniero de pritraktado kaj eventuala aprobadado de nove proponataj vortoj, speciale terminoj.

La libron aŭtoro verkis en diskutoj kaj kunlaboro kun iuj legantoj de la gazeto Konstru-Forumo. Estas pritraktataj 352 bazaj terminoj en Esperanto kun tradukoj en la angla, germana kaj ĉeĥa kun alfabetaj indeksoj en nomitaj lingvoj kaj en la slovena. Ĉiu nocio estas en Esperanto priskribita en la maniero konata el Plena Ilustrita Vortaro. Okaze estas en tiuj ĉi tekstoj ankoraŭ pliaj precizigaj terminoj. El la nombro de terminoj estas 77 hidrologiaj, el kanalizacio ĝenerale 10, drenado 53, el purigado de forfluaĵoj 141 kaj el la fako de pureco de akvoj 71. Alfabeto vicigo de la terminoj estas laŭ tiuj ĉi sekcioj, duvortaj terminoj kun antaŭvicigita substantivo. Per tio oni akiras bonan supervidon kaj facilan serĉadon de la terminoj.

*Josef Hron*

## Vuk Echtner kaj Juliana Bendová

La nomo de Vuk Echtner (1905-1994), honora membro de ĈEA, estas konata inter esperantistoj pro liaj pedagogiaj aktivecoj por blinduloj. Li estis multjara redaktoro de brajla gazeto Aŭroro kaj instruis Esperanton eĉ al adoleskanta Jaroslav Ježek, posta glora komponisto. Nur margene ni scias, ke li aktivis ankaŭ en religia movado bahaismo, sed tute nekonata estas lia kunlaborantino Juliana Bendová. Sole en la gazeto Esperantista 1946, paĝoj 52-53, aperis artikolo de Míla Kolář *La vojo okcidenten*, kiun esperantigis J. Bendová-Trojánková. Alie ŝi estis tute forgesita.

La 2-an de julio 2015 mi ricevis rete demandon de bahaistoj, ĉu mi povus enĉeĥigi notlibron de Juliana Bendová, pionirino de bahaismo en Ĉeĥio kaj kunlaborantino de V. Echtner. La notlibron ŝi skribis parte ĉeĥe kaj parte esperantlingve. Mi konsentis, ricevis skanaĵojn de la notoj kaj post mia traduka laboro oni sendis al mi ankoraŭ aliajn materialojn pri ĉeĥaj bahaistoj.

El la materialoj mi kunmetis ŝian biografion. Ŝi naskiĝis 19.11.1898 kiel Trojánková kaj mortis 29.11.1986.

En 1926 ŝi partoprenis propagandan prelegon de usona bahaistino Martha Root. Ŝi komence prelegis angle kaj interpretis Alexander Somer-Batěk, sed li malbone komprenis ŝian sanfranciskan prononcon. Kiam ŝi eksciis, ke inter aŭskultantoj estas esperantistoj, ŝi decidis prelegi en Esperanto. J. Bendová interpretis kaj V. Echtner poste eldonis prelegon de M. Root *Bahaaj sciencaj pruvoj pri vivo post morto* por UK en Danzig (Gdansk) en 1927, kiun M. Root

persone voĉlegis. Do en la jaro 1926 komenciĝis kunlaboro de la bahaa movado kaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio.

Fakte la unua bahaisto en Aŭstrio-Hungario estis en 1909 Karl Krüttner el Saaz (Žatec), instruisto de knaba lernejo, kaj unua ĉeĥo en 1913 Miloš Wurm el Brno, sed ili verŝajne ne estis esperantistoj.



Sur la du bildoj el 1930 estas juna V. Echtner kun M. Root (ambaŭ kun okulvitroj)

J. Bendová estis korespondantino en fabriko Praha-Vysočina, sed loĝis en Roztoky nad Vltavou, tial pro ĉiutaga vojaĝado mankis al ŝi tempo por vizitado de bahaistaj kunvenoj, tamen ŝi ne maltrafis vizitojn de M. Root. Ĵurnalistino M. Root vojaĝis tra la tuta mondo prelegante, en Prago ŝi plurfoje prelegis en Virina Klubo Ĉeĥa (ve Smečkách). Sed en 1939 ŝi mortis surŝipe vojaĝante hejmen kaj estis entombigita en Honolulu.





*Sur la fotoj el 1949 ni vidas V. Echtner kaj J. Bendová (supre ŝi estas super la ŝultro de Vuk, malsupre tute dekstre, Vuk malantaŭe tria de dekstre).*

Post la milito ĉeĥaj bahaistoj daŭrigis sian laboron, ĉeĥigis bahaismajn tekstojn kaj stencile ilin multobligis kaj disdonis. En 1957 religia societo Unitaria proponis al ili sian ejon por kunvenoj, sed necesis oficiala permeso. Kiam la oficoj ne respondis ilian peton, ili urĝigis ĝin. Reagis sekreta polico, kiu ambaŭ arestis (J. Bendová kaj V. Echtner), la bahaismajn materialojn konfiskis. J. Bendová revenis post 11 semajnoj, sed Vuk Echtner post 22 monatoj.

Li estis konsiderata la ĉefa kulpulo, ke li disvastigis bahaismajn tekstojn malamikajn „al popoldemokratia ŝtata reĝimo kaj socia ordo de la respubliko, al Sovetunio, marks-leninisma instruo kaj komunismo.“

J. Bendová skribas en sia notlibro, ke la 9-an de julio 1958 posttagmeze venis al

ŝia loĝejo tri sinjoroj, montris sian legitimilon kaj konfiskis ĉiujn skribaĵojn kaj presaĵojn. Ili forkondukis ŝin al arestejo en Ruzyň.

Poste ŝi priskribas siajn travivaĵojn dum transportoj al Brno, Ostrava, Opava, Přerov, denove al Prago. Ŝi renkontis ankaŭ aliajn prizonulojn, kelkajn vere krimajn, aliajn senkulpajn. Ankaŭ inter la gardistoj estis homoj malbonaj kaj bonaj. En septembro ŝi estis transdonita al psikiatria sanatorio en Opava, de kie ŝi revenis en januaro 1959.



*Vuk Echtner kaj Julianiana Bendová nelonge antaŭ ŝia morto*

En la retejo estas trovebla filmo *Bahá'í víra – Oceán jednoty, 1991* (Bahaismo – Oceano de unueco), en kiu dufoje aperas intervjuo kun Vuk Echtner (13-a kaj 18-a minutoj). Li rememoras, ke kiam li revenis hejmen post 22 monatoj, li povis trovi laboron nur en ŝtonminejo kaj kiel hejtisto. Iru al:

[www.youtube.com/watch?v=xFhtoURd16k](http://www.youtube.com/watch?v=xFhtoURd16k)

Vuk Echtner daŭre laboris por blinduloj, mi konis lin persone kiel prezidanton de nia pedagogia sekcio. En Ĉeĥoslovaka Antologio 1935 aperis sep liaj eminentaj tradukoj.

*Miroslav Malovec  
fotojn liveris ĉeĥa nacia arkivo Bahá'í*

## 60 JAROJ DE ESPERANTO EN NETOLICE

En septembro 1955, tri jarojn post kiam Asocio de ĉeĥoslovakaj esperantistoj ricevis ordonon "libervole" malfondiĝi, kuraĝe kaj en nefacilaj kondiĉoj komenciĝis la 1-a Esperanto-rondeto en la urbo Netolice. Instruis en ĝi František Nymburský, kiu dum ia ajn vetero oferece ĉiusemajne biciklis tien el 25km malproksima České Budějovice. La kurson partoprenis ankaŭ tiam nur 11-jara Jan Řepa, kiu, entuziasmiĝinte, sekve kun kelkaj kursanoj aliĝis ankaŭ al tendaro en Popelná en Šumava, organizita de E-klubo "La Ponto" Písek (1957).



Ekde 1979 ekfunkciis ĉe la urba Domo de pioniroj kaj junularo rondeto, kiu ppor povi daŭri devis oficiale porti la nomon Klubo de internacia amikeco. Komence instruis la lingvon Stanislav Papírník, post lia malsaniĝon transprenis lian rolon Jan Řepa, kiu sukcese gvidis la grupon dum 10 jaroj. La infanoj ekkonadis la mondon ne nur pere korespondado, sed ankaŭ dum vojaĝoj eksterlanden. En lia kurso por plenkreskuloj, okazinta en la Urba biblioteko, lia plej sukcesa lernanto estis Vladimír Türk, kiu nuntempe estas unu el la plej aktivaj membroj de ĈEA sur kampoj de son- kaj

kantregistrado, filmkreado, tradukado kaj ciferecigado.

Duopo Řepa-Türk en la 21-a jarcento multe aktivis: estiĝis i.a. pluraj dublitaj aŭ subtekstigitaj filmetoj (ne nur) pri Suda Bohemio kaj sonregistraĵoj de la tradukoj el la ĉeĥa literaturo; ambaŭ grave rolas ankaŭ en la ĈEA-projekto "Karel Čapek". Dank al traduko de V.Türk Netolice havas eĉ du oficialajn retejojn (la urban kaj tiun de la arkeoparko) ankaŭ en Esperanto versio kaj Kratochvíle disponas pri Esperanta ĉiĉerona teksto tra la kastelo. Tiuflanke la urbo havas eble unikan pozicion eĉ tutmonde!

La historio surfote kaj sur tiutempaj dokumentoj estis prezentita dum speciale farita ekspozicio, kiu fariĝis parto de la migra ekspozicio "*Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*", kies solena inaŭguro okazis la 4-an de septembro en la Muzeo de JUDr. Otakar Kudrna.



Partoprenis ĝin ankaŭ vicurbestro Pavel Pilař, kiu same kiel direktorino de la muzeo Daniela Liščáková en la 1980-aj jaroj lernis ioman tempon Esperanton, do havis favoran sintenon al la temo. Kadre de la programo la vicurbestro kune kun Jan Řepa prezentis amuzan cimrmanologian klarigon pri estiĝo de Esperanto.



Vladimír Türk kun aŭtorino de la ekspozicio Pavla Dvořáková prizorgis muzikan programon kaj fine per "Talina fiŝlago" kantigis en Esperanto ĉiujn ĉeestantojn. Dissendita presraporto altiris ankaŭ atenton de la regionaj amaskomunikiloj. Estis realigita intervjuo kun Jan Ĥepa por Radio České Budějovice kaj aperis artikolo en "Prachatický deník".



Sekvatage kontinuis solenado de la datreveno en Esperanto-medio, kadre de **la 9-A POSTFERIA RENKONTIĜO**, kiun post 6 jaroj klubo "La Ponto" Písek realigis denove en Netolice.

Danko apartenas al la direktorino de la muzeo, kiu tre afable senpage alirebligis la kulturalan salonon por la antaŭtagmeza programo. Bedaŭrinde, precipe pro ekstremaj veterŝanĝoj ĉi-jare partoprenis konsiderinde malpli da personoj ol en 2009, tamen la programo estis riĉa, kun substreko al videoregistrado de unuopaj kulturaj programoj por bezono de plua diskonigo.

Al la programo orientita ĉi-jare al historio ĝenerale kontribuis: la ĉef-organizanto Pavla Dvořáková, per renesancaj komponaĵoj (flute kaj plane) kaj mallonga prelegeto pri soneto, kies konkretajn ekzemplojn prezentis ankaŭ

P. Chrdle, J. Ĥepa kaj J. Malá. Netolicanoj projekciis du mallongajn filmojn pri Esperanto - pri la urbo kaj pri Petr Vok, M. Türková parolis pri la datreveno de Majstro Johano Hus lige kun aktiveco de brazilaj spiritistoj, P. Chrdle prezentis en plurajn siajn librojn rilatajn al historio (ekde bibliaj tempoj ĝis futuro).

Realigis videoregistraĵoj de pluraj kantoj de Miroslav Smyčka: sudbohemiaj kantoj (en la muzeo), Psalmo 23 de A. Dvořák (en la urba preĝejo), ĥoralo Sankta Venceslao (kastela kapelo), Korpo estu salutita de Mozart kaj Lulkanto de Flies (en la Supra salono en la kastelo, kun pianoakompano de P. Dvořáková). Parte videoregistratan trarigardon de la kastelo gvidis en Esperanto renesance kostumitaj J. Ĥepa kaj V. Türk en roloj de la nobelo Petr Vok kaj lia kronikisto Václav Březan. Danke al afableco de la kastelestro Vojtěch Troup la trarigardo okazis ankaŭ senpage. Ĉiuj faritaj registraĵoj estos post prilaboro diskonigitaj en Interreto.

Restas nur danki al la netolicaj esperantistoj por ilia ĝisnuna agemo kaj deziri al ili multajn vivofortojn kaj espereble ankaŭ novajn adeptojn kaj posteulojn!

*Pavla Dvořáková*





Petr Vok

**VYZNÁNÍ LÁSKY  
JIŽNÍM ČECHÁM**

**Denně Bohu děkuji a po něm praotci  
pětilisté růže Vítkovi,  
že přisoudili narodit se a žít  
v tomto kraji!**

**Mé jižní Čechy! Jsem tu vrostlý  
všemi kořeny až po pás.  
Když projíždím loukami  
i poli od Třeboně k Soběslavi,  
od Hradce Jindřichova až daleko  
za Vimperk, cítím, jak denně  
tu zarůstám hlouběji a hlouběji.**

**Na celém světě není  
krásnější země.**

**Kdysi zvedla bouři  
za pravdu Boží,  
aby hnula svědomím Evropy - - -  
a dnes leží si tu opět v rovinách  
pokojně i mezi chlumpy  
jako velký včelín.**

**Postojíš u chalupy a nasloucháš,  
jak měkká blatská řeč  
rozvážně protéká hovorem  
jako ty naše luční potoky a řeky.**

**Projíždíš hrázemi v mlžném  
soumraku kolem rybníků  
a pochopíš, že jedině zde naši prostní  
mohli se naučit přemýšlet o pravdě  
Boží, protože jedině tady denně vidí  
od obzoru k obzoru  
celé Boží nebe.....**

Petr Vok

**AMKONFESO  
AL SUDA BOHEMIO**

**Ĉiutage mi dankas al Dio kaj post li  
al la prapatro de la kvinpinta rozo Vítek,  
ke ili aljuĝis naskiĝi  
kaj vivi en tiu ĉi regiono!**

**Mia suda Bohemio! Mi estas  
enkreskinta ĉi tie per ĉiuj radikoj  
ĝis la talio. Vagante tra la herbejoj  
kaj kampoj de Třeboň al Soběslav,  
de Hradec Jindřichův ĝis  
malproksimen post Vimperk,  
mi sentas min enkreskadi ĉiutage  
pli profunden.**

**En la tuta mondo ne estas  
lando pli bela.**

**Iam ĝi vekis ŝtormon  
pro la vero Dia por ekskui  
konsciencon de Eŭropo ---  
kaj hodiaŭ ĝi denove kuŝas trankvile  
en la ebenaĵoj kaj ankaŭ inter altaĵoj  
kiel granda abelujo.**

**Ĉe bieno vi staras kaj aŭskultas,  
kiel la mola torfregiona dialekto  
prudente tra parolo fluas  
same kiel la herbejaj riveretoj  
kaj riveroj niaj.**

**Trans la digoĵ ĉirkaŭ fiŝlagoj  
vi veturas en nebula krepusko  
kaj ekkomprenas, ke sole ĉi-tie niaj  
rustikuloj lerni povis cerbumi  
pri la vero Dia, ĉar nur ĉi tie  
ili ĉiutage vidas ekde la horizonto  
al la dua la tutan ĉielon Dian...**

*tradukis Vladimír Türk; la videoregistraĵo en historia  
kostumo okazis en la kastelo Kratochvíle  
kadre de la 9-a PoFeRo la 5-an de septembro 2015*

# Kluba vivo

**Brno:** Klubaj programoj: Ekumena kongreso Strasburgo (9.9.), Vizito de francaj esperantistoj (16.9.), Ĉu Esperanto evoluas kiel lingvo de scienco? (23.9.), IJK Wiesbaden (30.9.), SES Martin 2015 (7.10.), Idiotismoj (14.10.), Moluskoj (21.10.), A. Zhoř kaj E. Štorch (4.11.), Gerta malaperis (11.11.-25.11.), Esoteriko (18.11.), Josef Vondroušek (2.12.), Amuza instruado (9.12.), Kristnasko venas (16.12.).

## Mladá Boleslav:



foto Pavel Šubrt

Vicurbestro Jiří Bouška akceptis grupon da esperantistoj. Kun Jindřiška Drahotová venis ŝiaj gastoj Bruno Henry el Francio kaj Man Juan el Ĉinio (ŝi preparis ĉinan manĝon por la klubanoj).



Bruno Henry estas nia honora membro de la jaro 2000. Li vizitadas nian klubon post siaj vojaĝoj - en Rusujo, Ukrainio, Turkio, Irano kaj Ĉinio kaj rakontas en rondo de boleslavaj amikoj en nia klubejo voje hejmen al Francio aŭ Ĉinio.

## Prostějov:



En julio venis kvar esperantistoj el Kanado, kiuj vizitis abismon Macocha. Ekde septembro daŭrigas sian agadon skolta rondeto en la elementa lernejo Kollárova.

**Třebíč:** Tendaron en Lančov vizitis redaktorino de Ĉina Radio Internacia dum la renkonto de eksaj tendaranoj fine de la tria etapo. Alveturigis ŝin redaktoro de nova Verda Stacio.

## Laboro de EK Třebíč

La klubo havas nun 32 membrojn. El kvin honoraj membroj de ĈEA restis nur unu, nome mi. De 19 dumvivaj membroj nur 14. El tiuj, kiuj ĉefe zorgas pri SET Lančov, 18 vivas ekster la urbo Třebíč. La kluba komitato decidis la kluban domon de prof. Kilian kun la klubejo forvendi. Por la mono ni volus aĉeti la lokon, sur kiu staras kabanaj de nia SET.

Esperanton instruas en infana rondeto de granda lernejo en Okříšky jam pli ol 20 jarojn Dr. prof. Kamila Bártlová-Lampířová.

En la tria etapo de SET partoprenis la E-kurson nur du kursanoj, la kurson gvidis M. Malovec.



Miroslav Malovec kaj Karel Madzia preparis ĉambron (t.n. privatejon) por la meblaro de laborejo de prof. Kilian. Ili ambaŭ havas la horonon dum la venonta SET en la ĉambro loĝi. En la meblaro estos lokita Esperanto-biblioteko de la profesoro. En la granda bruna kabano nomata „ekzekutejo“ estos lokita biblioteko de libroj ĉeĥaj, anglaj, germanaj.

La komitato de la klubo decidis, ke ĉiuj, kiuj aliĝos al E-kurso en la venonta SET, ricevos senpage vortaron ĉeĥan-esperantan kaj aliajn materialojn.

Ĉi-jare ne okazis la 1-a etapo. Dum tiu tempo niaj membroj tute senpage post 35 jaroj riparos la kuirejon.

*Pavel Sittauer*

## SPECIALA NUMERO DE LA REVUO "INDECS" DEDIĈITA AL ESPERANTO

"The Phenomenon of Esperanto" (La fenomeno Esperanto) estas la titolo de speciala numero de la revuo "INDECS: Interdisciplinary Description of Complex Systems" (Interdisciplina priskribado de kompleksaj sistemoj) lastatempe eldonita en Kroatio. La kolekto, sub redakto de profesoro Humphrey Tonkin kaj doktoro Veronika Poór, estas la dua numero de volumo 13 de INDECS (2015). La kolekto estas anglalingva kun resumoj en la kroata lingvo, kaj estas direktita ĉefe al fakuloj ekster la Esperanto-movado.

Dek du artikoloj prezentas ampleksan aliron al Esperanto, inkluzive de trarigardo de la faka literaturo, fare de Detlev Blanke (Gesellschaft für Interlinguistik, Berlino) kaj ĝenerala enkonduko de Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford, Usono). Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig) proponas kontribuojn pri Esperanto-frazeologio, Wim Jansen (Universitato de Amsterdamo) ekzamenas Esperanto-gramatikon kaj Duncan Charters (Kolegio Principia, Usono) esploras la instruadon de Esperanto.

INDECS estas eldonata en Zagrebo de la Kroata Interdisciplina Societo kun subteno de la Kroata Ministerio pri Scienco, Edukado kaj Sporto.

La artikoloj estas alireblaj ĉe [www.indecs.eu](http://www.indecs.eu) kaj la presita volumo estas havebla ĉe la Libroservo de UEA, <http://katalogo.uea.org/> (prezo: 22,50 EUR).

*laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA*



# Josef Kremláček

(1937-2015)

La akademia petrismo Josef Kremláček, internacie konata ilustristo de infanlibroj, estis membro de esperantista klubo en Třebíč kaj amiko de SET Lančov, kie li partoprenis renkonton de iamaj tendaranoj en la jaroj 2008 kaj 2013.

Laŭ atesto de Pavel Sittauer, Josef Kremláček partoprenis SET Chvalatice en 1952 kiel 15-jara knabo, kie li desegnis sur sia tendo indianan kapon (Pavel havis iomete problemojn, ke li tie edukas amerikan kulturon), kaj faris desegnon de la tendaro, kiu konserviĝis.



*J. Kremláček (barbulo) kun Dieter Berndt (Ĉenda) kaj Pavel Sittauer en Lančov 2008, fotis V. Rataj*

Inter 1951-1955 li studis en art-industria lernejo en Brno fakon de propaganda grafikado ĉe profesoroj Brukner kaj Zemina. Poste li laboris en reklama entrepreno en Pardubice, sekvis soldata servo, feliĉe en Prago, kie li povis vizitadi galeriojn kaj ekspoziciojn. Sed daŭris kelkajn jarojn, antaŭ ol li sukcesis eniri art-industrian altlernejon en Prago ĉe prof. Adolf Hoffmeister (1964-1970).

Li komencis desegni unue humuron, poste ilustraĵojn por la infanaj gazetoj Mateřídouška kaj Sluníčko kaj poste li

ricevis inviton de la eldonejo Artia ilustru infanlibrojn, eĉ por eksterlando.

Liajn ilustraĵojn oni povas trovi ĉe fabeloj de H. Ch. Andersen, ĉe fabeloj koreaj, siberiaj, indianaj kaj speciale aztekaj, ĉe rakontoj de faraonoj (J. Tomek), eĉ ĉe vojaĝlibroj de Miloslav Stingl kaj kompreneble ĉe multaj ĉeĥaj infanlibroj. Dum la vivo li havis 250 ekspoziciojn.

Li mortis en sia loĝejo sola, la supozata dato de lia morto estas la 22-a de junio 2015.

# Vladimír Herman

(1929-2015)

Pavel Sittauer ricevis informon, ke la 26-an de majo 2015 forpasis lia amiko Vladimír Herman, honora membro de ĈEA.

En 1957 V. Herman partoprenis Esperanto-kolegion en Doksy, poste fariĝis gvida funkciulo en Svazarm kaj en 1958 ebligis al P. Sittauer daŭrigi somerajn Esperanto-tendarojn kiel Svazarm-aranĝojn, post kiam la ministerio de kulturo ilin malpermesis pro suspekto, ke tie estas la junularo edukata en spirito skolta, malamika al la socialismo. Kaj kiam li fariĝis sudmoravia sekretario de la komunista partio, li prizorgis pere de vojaĝ-agentejo du grandajn financajn subvenciojn por la tendaro en Lančov (sume 2,5 milionoj da kronoj).

La unua subvencio ebligis aĉeti la grandegan kabanon, kiu servas kiel kancelario, manĝejo kaj kuirejo, per la dua oni aĉetis kabanojn, kiam en la regiono estis malpermesita tendumado pro higienaj motivoj (la digolago de Vranov liveras trinkakvon). Pro tiuj ĉi meritoj li ricevis honoran membrecon de ĈEA en 1987. *laŭ Pavel Sittauer*

# KALENDARO 2015

2015-09-26/27 "Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo" - inaŭguro de la nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo Svitavy

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2015-09-28/30 Vizito de ĉinaj esperantistoj en Svitavy

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2015-10-01/04 La 4-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice

Info: [verdastacio@gmail.com](mailto:verdastacio@gmail.com)

2015-10-19/25 Aŭtuna Seminario

en Skokovy

Info: [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz)

2015-10-23/25 Jarkunveno de ĈeFEA en Kořenov

Info: [cefea@centrum.cz](mailto:cefea@centrum.cz)

2015-11-06/08 Anstataŭa Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Ústí nad Orlicí

Info: [cea@esperanto.cz](mailto:cea@esperanto.cz)

2015-12-05 Antaŭkristnaska renkontiĝo

en Písek

Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2015-12-06 La 8-a Marcipana Kristnasko en Svitavy

Info: [svitavy@esperanto.cz](mailto:svitavy@esperanto.cz)

2015-12-29 Esperanta Silvestro en Česká Třebová,

Info: [jk.esperanto@seznam.cz](mailto:jk.esperanto@seznam.cz)

## Náhradní sjezd ČES !!!

Jelikož sjezd ČES dne 26.9.2015 nebyl dle očekávání schopný se usnášet, **svolává výbor** v souladu s dřívějšími informacemi **náhradní sjezd na 6.-8.11.2015 do Ústí nad Orlicí**. Přihlášky a vše podstatné najdete ve Startu č.2. Časový rozvrh plánovaného stejného programu dostanou přihlášení později s podrobnými informacemi. Náhradní sjezd je schopen se usnášet při jakémkoliv počtu. Nejpodstatnější bude přijetí nových stanov.

*Ing. Vladimír Dvořák, předseda*

## Ni kondolencas

- la 2-an de junio 2015 mortis en aĝo de 83 jaroj s-ro **Karel Štěpánek** el Dolní Čermná proksime de Lanškroun

- la 21-an de aŭgusto 2015 forpasis sinjoro **Nicholas (Mikuláš) Nevan** en aĝo de 70 jaroj en Florida(Usono), iama junulara aktivulo de ĈEA kaj UEA. Pli detala artikolo aperos en la venonta numero.



- La 14-an de septembro 2015 post grava malsano forpasis **František Zelinka** (1951) el Prago, kameraisto ĉe la Ĉeĥa televido, kiu filmis nian muzeon.

- la 5-an de septembro 2015 post longa malsano forpasis **Jelena Grigorjevna Ŝevĉenko** (1962-2015), kunfondinto de la moskva esperantlingva eldonejo Impeto, patrino de fama esperantisto Dima Ŝevĉenko.

## Ĉu vi deziras korespondi?


Mi estas itala esperantisto, 41-jara, ofi-cisto en kultura instituto kaj mi ŝatus korespondi kun aliaj esperantistoj. Al mi plaĉas la historio kaj la lingvoj, antikvaj kaj modernaj. Ĝis, Ivan Orsini  
[ivarpas@yahoo.it](mailto:ivarpas@yahoo.it)

## Nia kroniko

Aŭtune atingas siajn vivjubileojn konataj esperantistoj Jindřiška Dubinová, Libuše Filipová, Ludmila Srbová, Vladimír Dvořák, Oldřich Arnošt Fischer, Václav Pospíšil, Miroslav Severa. Gratulon.

EK "La Ponto" invitas vin al

**ANTAŬKRISTNASKA  
RENKONTIĜO (AnkRo)**  
sabate la 5-an de decembro 2015  
en Písek



ekde 10:00 – Kultura matineo  
en Urba biblioteko

eta promeno tra la urbo, ev. vizito de  
aktualaj ekspozicioj en la muzeo

ekde 13:15 Posttagmeza frandado kaj  
programo komponita el kristanaj kaj  
popolaj adventaj tradicioj (en „ĉevalejo“  
de la paroĥejo Písek) kaj dediĉita ankaŭ  
al la Zamenhof-Tago

**KONTAKTO:**

písek@esperanto.cz  
Pavla Dvořáková, 774 942424

Kaze de intereso pri partopreno bv.  
nepre anonci vin ĝis 2.12.!

**101-a Universala Kongreso de  
ESPERANTO**  
**23.-30.07.2016 Nitra, Slovakio**

## **ALIĜADO AL LA 101-A UK EN NITRO KOMENCIĜIS**

La 101-a UK en la slovakia urbo Nitro (23-30 julio 2016) akceptis la unuajn aliĝojn dum la 100-a UK en Lillo, kie ĉiu kongresano trovis aliĝilon en sia kongresa sako. La papera aliĝilo estos dissendita kun la septembra numero de la revuo *Esperanto* kaj eblas peti ĝin, ankaŭ grandkvante, de la Centra Oficejo de UEA aŭ elŝuti ĉe la kongresa retejo. Plej facile tamen oni povas aliĝi per la reta aliĝilo.

La aliĝkotizoj restas samaj kiel jam por la tri antaŭaj UK-oj. La plej favorpreza aliĝperiodo daŭros ĝis la 31-a de decembro 2015.



### **Greziljono**

16-a ĝis 20-a de oktobro 2015 : **Korusa  
renkonto**, retejo [www.gresillon.org/koruso](http://www.gresillon.org/koruso)

24-a de oktobro ĝis 1a de novembro 2015 :  
**kursaro AŬTUNE**, retejo  
[www.gresillon.org/autune](http://www.gresillon.org/autune)

MCE Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150  
BAUGÉ-EN-ANJOU, France,  
+33 - 241 89 10 34, [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)



## Jak platit svazu

**Pozor, změna účtu!**

**Nyní Fio banka Svitavy**

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

## Pozor!

### Změna předplatného časopisů!

**Vzhledem k navýšení cen vydavateli a změně kursu koruny došlo k úpravě předplatného.**

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, e-mail: [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz). Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

**Monato:** 1280,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 720,-Kč

**La Gazeto:** 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto:** 700,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 440,- Kč.

**Juna Amiko:** 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

**Literatura Foiro:** 1280,- Kč (\*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

**Femina:** 870,- Kč (\*580,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

**Heroldo de Esperanto:** 1330,- Kč (\*870,- Kč), v.s.07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3

(vydávání HdE není zcela pravidelné!!!)

\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého  
esperantského svazu - 46. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku (bez členství ve  
svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,  
683 04 Drnovice,  
vratislav.hirs@esperanto.cz,  
tel. 517 444 117**

**Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2015**

---

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
- - 46-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster  
Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, starto@esperanto.cz**

**http://www.esperanto.cz/starto**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
15.11.2015**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

## **Estimataj esperantistoj**

aperis LEGOLIBRETO XI. kun abundaj artikoloj kiujn verkis krom aliaj Jiří Patera, Jindřich Ondráček, Max Kašparů, Jaroslav Dušek, Jens S.Larsen, Kerstin Rohdin, Zlatko Tišljar, Rajko Doleček, Pedro Hernadez, Gudrun Pausewang, Vladimír Samodaj a další.

Petu ĉe [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz) tel.  
720 652 320 Prezo: 50,-Kč

## **Novaj libroj ĉe UEA Libro servo**

**Raportoj el Japanio 18**, (Katastrofo de Japanio en la kvara jaro). Jasuo Hori, 13,80 EUR

**Aline**, C.F. Ramuz, 10,80 EUR

**El la korkelo**, Kun aldonaĵo de Biblio - Ijobo. Johano Besada, 7,20 EUR

**La Interna milito en Francujo (1871)**, (La Pariza Komunumo). Karlo Markso, 12 EUR

**Novaj vojoj**, Hector Hodler, 8,40 EUR

**Konsilo de ateisto: kredo je Dio**, István Sigmond, 16,50 EUR

**La Fermaskito, La: kiu li estis?** André Cherpillod, 5,10 EUR

**Malkovri Frislandon / La juna voĉo**, Roman Dobrzyński, 12 EUR

**Bonvenon al Armenio**, Roman Dobrzyński, 12 EUR

**Oftecvortaro de Esperanto**, 20,70 EUR

**Tra la lando de kanguruoj**, Tibor Sekelj, 12 EUR

**Belarta rikolto 2015**, Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, 9 EUR

**Perversaj rilatoj**, Victor Sadler, 9,9, EUR

**Lingvomanio**, Proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj en Eŭropo, 6,60 EUR

**La Templo de l' suno**, Hergé, Tinĉjo kaj sia hundo Milu` spertas novajn aventurojn en Sud-Ameriko, 12,60 EUR



**Nia filmo el Lillo:** Estraro de UEA – Etoso en prelegejoj – Ekskurso – Kantado – Senvualigo de Zamenhof-monumento – Infana kongreseto – Transdono de flago al organizantoj de UK 2016 en Nitra

*fotoj L. Dvořáková, M. Bloudek*